I. F. E. A.

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A."; e alla ITALA ESPERANTO-FEDERACIO "F.E.I." (Ente Morale-D.P.R. 28-6-1956 n°1720. Sede Centrale: DOPOLAVORO FERROVIARIO Bologna (Italujo)
Redazione: Via Donato Creti, 61 Bologna (Italujo) tel. n° 359071. C.C.P. n° 8/24094.

I N F O R M A   B U L T E N O - I T A L A   F E R V O J I S T O

N° 1 - 2 Januaro - Februaro 1963-a 13-a Jaro

## AVVISO DEL CASSIERE

Si é chiuso l'anno solare ed ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per il 1963. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli scorsi anni, per cui preghiamo vivamente tutti ad inviare la quota urgentemente a mezzo del C.C.P. n°8/24094, oppure due righe di dimissioni, VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI.
SOSTENETE L'ASSOCIAZIONE - ADERITE ALL'I.F.E.A.

Chi riceve il presente "Informa Bulteno-Itala Fervojisto" e non intende riceverlo ulteriormente, e non ha interesse al nostro movimento è pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 Bologna. Grazie anticipate.

## LA 15-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

en Stoke-on-Trent (Britio), inter la 11-a kaj 17-a de majo 1963. Bankkonto: ML.12.C.W.S. Bank, Stoke-on-Trent. Korespondadreso: S-ro Horace Barks, 24 Marsstreet, Smallthorne, Stoke-on-Trent (Britio). Landa Kongresa Komitato: Prezidanto: Horace Barks. Sekretario: R.W.Deakin. Kasisto: T.C.Tasker.

### 2-a K O M U N I K O — KONGRESA PROGRAMO

Vendredo 10-5: Malfermo de la kongresejo. Akcepto.
Sabato 11-5: Distribuado de la kongresdokumentoj.
15,30 Redaktora kunveno. 19,00 Kunveno L.K.K kaj I.F.E.F.-estraro.
19,30 Interkonatiĝa kunveno en "Kings Hall".
Dimanĉo 12-5: 9,30 Solena malfermo de la kongreso en Jubilea Halo, fotografado en "Kingsway". 12,30 Komuna manĝo en "Kings Hall"
14,15 Aŭtobusekskurso norden al Jodrell Bank, Sandbach k.t.p. Proksimuma alveno en Trentham Gardens 18,30; vespermanĝo; poste reiro al Stoke-on-Trent laŭ la suda limo de la urbo.
Lundo 13-5: Estrara kaj delegitara kunveno. 12,00 Manĝo en "Kings Hall".
14,00 Estraro kaj delegitaro vizitas Queensberry Lornejo.
16,00 Kunveno de la Fakprelega Komitato. 17,30 Vespermanĝo en "Kings Hall".
19,30 Teatraĵo kaj distraĵo en Mitchel Teatro, Hanley.
Mardo 14-5: 9,15 Kunveno de la Terminara Komitato. 12,00 Manĝo en "Kings Hall".
14,15 Duontaga aŭtobusekskurso al Alton, Dovedale kaj Buxton. Vespermanĝo. Reiro.
Merkredo 15-5: 9,15 Unua laborkunsido. 12,00 Manĝo en "Kings Hall".
14,30 Inaŭguro de Esperanto-strato. 16,00 Kunveno de la junularo.
17,30 Vespermanĝo en la Jubilea Halo. 20,00 Urba akcepto kaj balo en "Kings Hall".
Ĵaŭdo 16-5: 9,15 Dua laborkunsido. 12,00 Manĝo en "Kings Hall".
14,30 Fakprelego en la Jubilea Halo. 17,00 Vespermanĝo en "Kings Hall".
19,30 Akcepto de la kongresanoj en la Muzeo de Hanley. Demonstracio de la potfarista arto, farita de la plej lerta "trower" el Stoke.
19,30 Por la junuloj distra vespero en "Harold Clowes Community Hall" en nova kvartalo Ubbery-Bentilee. Demonstrado de dancoj.
Vendredo 17-5: Tuttaga ekskurso per vagonaro al Llandudno, Kimrujo. Ekveturo de la stacidomo en Stoke proksimume je la 9-a horo. Manĝo je la 12,30. 17,30 fermo de la kongreso. 19,30 ekiro al Llandudna stacidomo por reveturi al Stoke.
Sabato 18-5: Adiaŭo.

GENERALAJ INFORMOJ: Kongreskotizo: Kongresanoj aliĝantaj antaŭ 1-3, Shellini 33; de 1-3 ĝis 15-4, Shellini 38; post 15-4, Shellini 45. Familianoj kaj pensiuloj pagas la duonon. Loĝejoj (lito kaj matenmanĝo po-nokte kaj po-persono): Hotelo grupo A: Sh. 30 ĝis 40; grupo B: Sh. 21 ĝis 30; grupo C: Sh. 15½ ĝis 21; en privataj hejmoj: Sh. 11 ĝis 15.
Ekskursoj: A) 12-5: Duontaga al Jodrill Banks tra la bela Cheshire-kamparo kaj al Trentham Gardens, kie estos komuna vespermanĝo. Kostoj Sh. 12 entute.
B) 14-5: Duontaga tra la plej belaj partoj de la Graflando Stafford kaj Derby. Komuna vespermanĝo en Buxton. Kostoj Sh. 14 entute.
C) 17-5: Tuttaga al Norda Kimrujo per vagonaro. Aŭtobusoj portos nin al kaj ĉirkaŭ la Great Orme. Tag- kaj vespermanĝo en Llandudno. Kostoj Sh. 24 entute.
Manĝoj: Ili estos haveblaj en la kongresejo meztage kaj vespere, kaj kostos po Sh.5. Manĝbiletoj estas antaŭmendeblaj. Ne estos komunaj manĝoj en la kongresejo dimanc- kaj mardvespere kaj ne dum vendredo.
Vojaĝo: Oni proponas aranĝi apartan vagonaron el Londono je sabato la 11-a de majo, kaj ni deziras scii je kiu horo la plimulto de la kongresanoj estos en Londono. Sendube multaj tranoktos je vendredo en Londono. Aliaj alvenos per nokt-ŝipo el "Hook of Holland", alvenonte en Londono (Liverpool Street Stacidomo) post la naŭa, do ni provos aranĝi apartan trajnon ĉirkaŭ la dekunua. N.B. La Londona Esperanto Klubo kunvenas vendredon apud Euston Stacidomo, de kie ekiras la vagonaro al Stoke-on-Trent.
L.K.K. intencas instali malgrandan ekspozicion de Esperanto-materialo en la urbodomo. Ĝi petas alsendon de bonaspektaj Esperanto-gazetoj, modernaj flugfolioj, interesaj poŝtaĵoj K.T.P. Junuloj, kiuj deziras partopreni la distran vesperonje ĵaŭdo, menciu tion klare sur la aliĝilo.
INFORMAZIONI PER GLI ITALIANI: Tutti coloro che intendono intervenire al Congresso di Stoke-on-Trent possono inviare la loro adesione, accompagnata dal relativo importo, al Segretario Gimelli Germano, Via Donato Creti, 61 Bologna, che si é assunto la funzione di "peranto" per l'Italia. L'"aliĝilo" potrà anche essere trasmesso direttamente al: "Esperanto-Kongreso, 25 Marsstreet, Smallthorne Stoke-on-Trent (Anglio) ma deve sempre essere accompagnato dall'importo delle quote di adesioneal Congresso in ragione di £.90 per ogni Scellino, salvo conguaglio, se vi sarà sensibile differenza.
Fino al 1 marzo 1963 la quota di adesione é stabilita in Scellini 33 (£.2970) per il congressista e Scellini 16½ (£.1485) per familiari e pensionati.
Si raccomanda la massima precisione nella compilazione dell'"aliĝilo".
VISITA A LONDRA: Per visitare Londra abbiamo preso contatti con Samideani Londinesi che si interessano per una rapida visita alla città in autopulman, il giorno 10 maggio. Perciò il programmi di massima del viaggio della Delegazione Italiana sarebbe il seg.:
Mecoledì 8-5: ore 13,59 partenza da Bologna via Milano, Domodossola, Vallorbe, Parigi.
Giovedì 9-5: ore 15,50 arrivo a Londra stazione Vittoria.
Venerdì 10-5: visita a Londra in autopulman e ricevimento al Gruppo Esperantista Londinese
Sabato 11-5: ore 13 circa partenza in treno speciale da Londra per Stoke-on-Trent.
Invito gli interessati a comunicare con la massima urgenza al suddetto segretario, la loro adesione per fissare l'autopulman per il 10-5 e l'albergo a Londra per le notti 9/10 e 10/11 -5.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italio)
La dissendoj okazas de h.18,55 ĝis h.19,10 (M.E.T.)- Ondlongoj: metroj 30,90-41,24-50,34.
Prelegantoj: mardo kaj merkredo: S-ro L.Minnaja - vendredo: Prof.D-ro V.Musella.
DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1963-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.
FEBRUARO 1963-a: vendredon la 1-an: La Romaj Kasteloj - mardon la 5-an: Tra la literaturo - vendredon la 8-an: Italaj satiraj poetoj: Jozefo Giusti - mardon la 12-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 15-an: La itala insulo Elba - mardon la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 22-an: La Roma Karnavalo - mardon la 26-an: Leterkesto.

La Fakestro: L. MINNAJA